# Diakronio kaj evolu-fazoj de la leksiko kaj de la vort-farado en Esperanto

Philippe Planchon

Universitato de Tours, LLL (UMR 7270)

**Resumo.** Kiel vivanta lingvo, Esperanto necese evoluas pro la efiko de la tempo. Aliflanke, Esperanto estas ankaŭ karakterizata kiel konstruita lingvo, tiel ke gravas ankaŭ la kondiĉoj de ĝia apero. Ni klarigos kial necesas distingi tri evolu-fazojn. Tio devenas de la rilatoj inter normoj, uzoj kaj uz-eblecoj. Tiel eblas konsideri la strategiojn kiuj kontribuis al la ellaborado de la leksiko. Komence, la leksiko de Esperanto rapide evoluis, kaj tiu fenomeno estas analoga al tio, kion oni povas ankaŭ observi en aliaj lingvoj. La ekzisto de kontraŭaj tendencoj dum la komenca fazo kondukis al multe pli longdaŭra evoluo, tiel ke realiĝas iuj uz-eblecoj kiuj jam ekzistis dekomence en la sistemo de la lingvo. Tiurilate, ni montros ke la leksiko kaj la vortfarado koncernas plurajn nivelojn en la funkciado mem de la lingvo, kaj ke tio ankaŭ ludas rolon por la ekvilibrigo de la sistemo kaj por la uzado de la parolantoj.

**Ŝlosilvortoj:** diakronio, lingvo-evoluo, *Fundamento de Esperanto*, neologismoj, arkaismoj.

## 1 Enkonduko

Laŭ tipologia vidpunkto, Esperanto estas kaj ordinara lingvo, kaj tute aparta lingvo. Ĉe la lingva nivelo, Esperanto ja similas al aliaj etnaj lingvoj, kaj ne estas tiom eksterordinara (Koutny, 2015). Sed, ĉe la socia nivelo, Esperanto estas neatendita fenomeno, ĉar ĝi estas la sola planlingvo kiu atingis tian gradon de ensociiĝo (Blanke, 1985), kaj pro tio estas grave distingi inter lingvoprojektoj kaj plene funkciantaj planlingvoj kiel Esperanto.

Kial Esperanto plej bone sukcesis ensociiĝon ol aliaj lingvoprojektoj ? Certe estas sociologiaj faktoroj, kiel argumentas Ziko Marcus Sikosek (1999). Imagu ke Zamenhof estus proponinta tute alian lingvon (ekzemple la klingonan)... Estas tamen malfacile supozi ke iu ajn lingvoprojekto estus ricevinta la saman akcepton, nur pro la fakto ke ĝi estus proponita de Zamenhof en 1887. Do la lingva konsisto certe ludis ankaŭ tre gravan rolon. Sed kiamaniere ?

Ne temas nur pri elekto de tiu aŭ tiu alia formo de vortoj, radikoj, afiksoj. Pli profunde, temas pri la rilato mem inter la lingvo kiel kodo kaj la lingvo kiel praktika uzo.

Detlev Blanke tiel skribas : "Zamenhof intuicie komprenis la ĉefajn problemojn de strukturo kaj de funkciado de lingvo, inter kiuj estas la rilato inter lingvistika sistemo (*lingvo*) kaj ĝia aplikado (*parolo*), la graveco de lingva komunumo, la rilato inter stabileco kaj evoluo, kaj la problemo de normoj kaj de kodigo de tiuj normoj" (2009, p. 255 ; mia traduko).

Fakte, lingvoprojekto estas komence en paradoksa situacio. Ĝi konsistas el normoj kiuj ne estas uzataj de parolantoj. Poste ekaperas uzado, kaj fine aperas parolantoj. Inverse, ne-konstruitaj lingvoj konsistas el parolantoj, kiuj produktas paroladojn, kaj normigo alvenas poste. Kompreneble, internaj mensaj normoj (laŭ la koncepto de Chomsky ; Vd. Miner, 2011) povas ekzisti dekomence en etnaj lingvoj, sed interna gramatiko aperas nur laste en Esperanto.

## 2 Kriterioj de viveco kaj natureco

Kiam eblas paroli pri vivanta lingvo ? Kiam eblas paroli pri natura lingvo aŭ naturiĝinta lingvo ? Tie aperas la neceso pri iu speco de evoluo. Fakte, tiu demando estas malnova. Ekzemple, la fama lingvisto Ferdinand de Saussure tiel diris pri tiu demando :

> Tiu ĉi evoluo (de la lingvoj) estas fatala ; ne ekzistas ekzemplo de lingvo kiu rezistas al tiu evoluo. Post iom da tempo, oni ĉiam povas konstati iujn efektivajn movojn. Tio estas tiom vera, ke tiu principo devas esti atestebla eĉ se temas pri artefaritaj lingvoj. Tiu, kiu kreis artefaritan lingvon tenas ĝin en la mano, ĝis la momento kiam la lingvo komencas cirkuli. Ekde kiam ĝi plenumas sian rolon, kaj fariĝas ĉies afero, la kontrolo ne plu eblas. Esperanto estas tiuspeca provo ; se ĝi sukcesas, ĉu ĝi evitos tiun fatalan leĝon ? Post la unuaj momentoj, la lingvo probable komencos sian semiologian vivon (...) Homo kiu pretendus krei senŝanĝan lingvon, kiun la posteuloj devus akcepti tian kia ĝi estas, similus al kokino kiu kovis ovon de anaso ; la lingvo kreita de li estos forportita for de li, vole nevole, pro la fluo kiu kuntrenas ĉiujn lingvojn. (Saussure, 1995, p. 111 ; mia traduko)

Ĉi tie estas du argumentoj rilataj al la demando pri evoluo. La unua koncernas la dialektiĝon de la lingvoj. La dua koncernas la naturecon de la lingvoj.

Pri la unua argumento, necesas konsideri kiel povas evolui Esperanto. Nun estas parolantaro kaj multe da interŝanĝoj inter la parolantoj. Tamen tiu ĉi parolantaro estas disigata laŭ geografia vidpunkto. Do Esperanto ekzistas ĉefe kiel praktiko inter parolantoj de diversaj landoj, kun diversaj gepatraj lingvoj. La situacio tute ne estas nun favora por dialektiĝo. Verdire, dialektiĝo postulas ke la plejmulto da interŝanĝoj okazu inter parolantoj kiuj vivas en la sama loko. Poste, ĉiu dialekto distingiĝas de aliaj pro distanco inter la komunumoj, sed la parolantoj de sama dialekto vivas kune en sama loko. Eĉ se Esperanto estus multe pli vaste uzata ol nun, tia supozata dialektiĝo probable ne okazos, ĉar la komunikado per Esperanto plu estus inter homoj kiuj ne havas la saman gepatran lingvon, do loĝantaj en diversaj lokoj. Ni povas eĉ aldoni ke la disvolviĝo de la interreto evidente estas plia obstaklo al tia dialektiĝo.

Pri la dua argumento, Saussure uzas ĉi tie biologiajn metaforojn. Tamen, lingvoj ne estas vivantaj estaĵoj[1], kaj ne evoluas per apliko de naturaj leĝoj. La lingvoj povas evolui laŭ du manieroj : ĉu per konsciaj decidoj, ĉu pro inercio de la lingvoj. Konsciaj decidoj plene agas ĉe la stadio de lingvoprojekto. Sed post tiu momento, inercio pli kaj pli gravas por la evoluo de la lingvo. Inercio ne okazas hazarde, sed pro seriozaj kialoj, per adaptiĝo al eksteraj aŭ internaj bezonoj. La eksteraj bezonoj povas ekzemple esti neceso de adaptiĝo al novaj kulturaj, sociaj aŭ teknologiaj aferoj. La internaj bezonoj koncernas la lingvan sistemon, tiel ke la parolantoj senkonscie emas trovi iun ekvilibron en tiu sistemo, pro bezono de analogioj kaj reguleco, pro deziro de efikeco kaj de ŝparo de energio, kaj tiel plu.

### 3 Distingo inter evolu-fazoj

Nuntempe, Esperanto fariĝas pli natura lingvo, kaj tial Esperanto evoluas. Sed tiel ne estis ĉe la komenco. Tial, ni devas distingi tri ĉefajn evolu-fazojn de la lingvo.

**La unua evolu-fazo** [1878 - 1887] rilatas al la ellaborado de la lingvoprojekto. Ĝi ne estas limigata al la publikigo de la *Unua Libro*, kiu aperas fine de tiu fazo. Ĝi daŭris plurajn jarojn. Aparte menciindaj ŝpuroj de tiu fazo estas la pra-esperantoj (1878, 1881). Fakte, tiu prepara periodo estas interesa ĉar Zamenhof provis diversajn solvojn[2], kiujn li fine forviŝis. Ironie, pluraj decidoj de Zamenhof en 1887 estis poste kritikataj, kaj kondukis al proponoj en reform-projektoj (kiel tiu de 1894) aŭ en esperantidoj (i.a. Ido), kiuj ĝuste reuzas ideojn iam elprovitajn en la pra-esperantoj. Post la publikigo de la *Unua Libro* (1887), la lingvoprojekto estis libere uzebla de aliaj homoj, kiuj eklernis ĝin. Sed tiu uzo estis pli malpli eksperimenta, ĉar ne estis certe ke la lingvoprojekto povus konkrete funkcii. Tuj ekaperis etaj ŝanĝoj en la lingvo mem, la plej fama tiurilate estas ŝanĝo por iuj tabelvortoj jam en la *Dua libro* (1888)[3].

**La dua evolu-fazo** [1887 - 1905] ankoraŭ ne similis al la ordinara evoluo de la etnaj lingvoj. Ĝi daŭris almenaŭ ĝis la unua UK kaj la adopto de la *Fundamento* (1905). Multaj diskutoj pri aliaj lingvoprojektoj kaj reformoj eble plu bremsis la ensociiĝon de la lingvo, tiel ke tiu stabiliga periodo eble daŭris pli longe. Tamen taŭgas konservi tiun daton por la fino de la dua fazo. Fakte, al tiu periodo aludas Saussure per la vortoj "Post la unuaj momentoj", kaj tiam estis ĝuste por Esperanto la tempo kiam Saussure skribis tiujn vortojn (ĉ. 1906-1911).

[1] Fakte, Saussure eltrovis la principon de arbitreco de la signoj, kaj agnoskis ke lingvoj estas sociaj konvencioj.
[2] Ekzemple : neniu akuzativo, manko de futuraj participoj (-ont/-ot), pli latinidaj radikoj (1878), pliaj modifoj por la radikoj (1881), ktp. Pri la pra-esperantoj, vidu Waringhien (1959, 1980), Mattos (1987), Kiselman (2011).
[3] La serio *ian, tian, kian, nenian, ĉian* povis okazigi konfuzon pro la ekzisto de la serio *ia, tia, kia...* kaze de uzo de akuzativo (*ia-n, ti-an, ki-an...*). Pro tio, la serio estis ŝanĝita al *iam, tiam, kiam...* jam en 1888.

**La tria evolu-fazo** [ekde 1905 ĝis nun] estas la “semiologia vivo de la lingvo”. Ĝi plu daŭras, kaj dum tiu periodo, la lingvo submetiĝas al pli malpli normala evoluado. Kvankam ŝanĝoj estas jam videblaj, la ŝanĝoj estas tamen tre malrapidaj, kaj eblas klare vidi ilin nur retrospektive. Do necesos pli longa tempo por observi pli radikalajn ŝanĝojn[4]. Verdire, la termino "diakronio" validas nur por tiu tria evolu-fazo. La du unuaj fazoj estas iom alispecaj. Kaj por studi evoluon de la lingvo, teorie sufiĉas distingi inter tiuj tri periodoj[5].

## 4 Kompromiso kaj stabiligo de la lingvo-sistemo

Kiel stabiliĝis la lingvo inter 1887 kaj 1905 ? Ĉu estas esenca diferenco[6] inter la *Unua Libro* kaj la *Fundamento* ? Esperanto kreiĝis per publikigo de baza normo, sed iusence, tio okazis dufoje : la unuan fojon per la *Unua Libro* kiu estis lingvoprojekto, kaj la duan fojon per la *Fundamento* kiu estas retrospektiva kaj konscia akcepto de la normo far la parolantaro.

Tiu distingo ŝajnas paradoksa, kvankam konforma al la sociolingvistika intuicio de Zamenhof, kiu konsciis la neceson de uzado kaj de parolantaro por krei ne nur lingvo-projekton, sed vivantan lingvon. Tiu strategio postulis kompromisojn, kaj la *Fundamento* estas tia kompromisa bazo ebliganta pluan evoluon. Tamen, tiu-epoke la ideo de gvida bazo aspektis iom strange[7], des pli ke jam ekzistis lernolibroj. Do, multaj kritikis la Fundamenton kiel provon malhelpi la naturan evoluon de la lingvo. Sed tio estas misinterpreto. Zamenhof ĉiam rifuzis verki kompletan lingvon. Pro tio, la dua fazo trafe funkciis kiel stabiliga periodo.

Tiu stabiligo estis ja necesa, ĉar la lingvoprojekto ne enhavis ĉiujn pretigitajn detalojn. Kvankam Zamenhof multe pli preparis, ekzemple por la leksiko de Esperanto, ol li metis en la *Unua Libro* aŭ en la *Fundamento*, li preferis lasi al vivo aŭ al institucioj la respondecon decidi pri la evoluo de la lingvo. Se la lingvo ne estas kompleta, la parolantoj kompletigu ĝin. Se la lingvosistemo ne estas stabila, ĝi stabiliĝu dum tiu elprova periodo.

---

[4] En etnaj lingvoj, la ŝanĝoj estas profundaj nur post pluraj jarcentoj. Ekzemple en la franca, oni plu povas legi librojn el la 17a j.c. Same, la Esperanta lingvo fine de la 19a j.c. plu estas komprenebla por parolanto de la 21a j.c. Tamen, oni povas dubi ĉu reciproke Zamenhof tuj komprenus Esperantlingvajn tekstojn de la hodiaŭa tempo.

[5] Pliaj distingoj evidente eblas. Ni povas mencii pli detalajn proponojn faritajn kaj diskutatajn de Ilona Koutny (2018), kiuj ebligas distingi plurajn periodojn ekde 1905 (per aldono de aliaj pivotaj datoj kaj periodoj : 1920, 1930, 1945, 1960, 1989). Tamen, tiuj proponoj konsideras aliajn parametrojn, nome : evoluo de la lingvoscienco, produkto de gravaj verkoj (vortaroj kaj gramatikoj), gravaj politikaj kaj teknikaj ŝanĝoj. Tiuj parametroj povas influi la evoluon, sed ili nur aldoniĝas al la baza distingo kiun mi konsideras ĉi tie, por la diakronio de la lingvo.

[6] Krom la UL, la FdE baziĝas sur la *Dua Libro* (1888), la *Universala Vortaro* kaj la *Ekzercaro* (Vd. Ito, 1973).

[7] Pro tio, la *Fundamento* estis uzata diversmaniere laŭ la epokoj kaj vidpunktoj : kiel baza lernolibro (almenaŭ komence de la 20a j.c.), kiel lingvopolitika teksto (responde al reformismo), kiel kompleta sistemo (foje prezentita tiel kun propaganda celo), kiel historia dokumento (laŭ filologia vidpunkto), ktp.

Laŭ la kompromisa strategio, Zamenhof proponis modelojn kiuj povis esti akceptataj aŭ ne. Tiu stabiliĝo okazis ĉe diversaj niveloj de la lingvo. Ekzemple, eblis dekomence uzi elizion (16a regulo), sed tiu ebleco ne estis multe uzata poste. La sintakso ne estis plene fiksita[8], krom per ekzemploj de frazoj (en la *Ekzercaro*). La pronomo *ci* arkaikiĝis jam frue. Li enkondukis nedefinitajn elementojn (*je*, *-um*), kiuj nur poste akiris apartajn funkciojn. Li menciis la uzon de *h* kiel surogata litero (en la *Alfabeto*), sed tiu uzebleco neniam ĝeneraliĝis. Fine, li esprimis saman ideon de libera stabiliĝo pri la leksiko, per la ebleco aldoni novajn radikojn aŭ forlasi la uzon de aliaj, laŭ la tiel nomita *metodo de neologismoj kaj arkaismoj*.

Koncerne la leksiko, alia decido de Zamenhof estis la 15a regulo. Tiu regulo estas nur parte gramatika (rilate al la elekto de finaĵoj), sed ĉefa indikilo pri la maniero enkonduki novajn vortojn en la lingvo. Tiuj *fremdaj vortoj* estas plurfontaj radikoj, kaj tiumaniere, estas facile enkonduki en la lingvo *internaciajn vortojn*. Tiuj vortoj ĝenerale estas ankaŭ en lingvoj kiuj iel rolis kiel lingvoj internaciaj, ekz-e la latina, la franca, la angla, la germana, la rusa... Do, pro internacieco, la lingvo facile akceptas novajn vortojn, eĉ se ili estas nek fundamentaj, nek oficialigitaj. Tio bone funkciis, tiel ke la nombro de radikoj rapide kreskis[9], kiel montras la kresko de la nombro de radikoj inter la plej gravaj vortaroj de Esperanto (tabelo 1).

*Tabelo 1 – Kvanta evoluo de la Esperanta leksiko*

| |
|---|
| UL (*Unua Libro*, 1887) : ≈ 920 radikoj<br>FdE (*Fundamento de Esperanto*, 1905) : 2640 radikoj (inkluzive de UL) |
| OA (Oficialaj Aldonoj, publikigitaj ĝis 2007) : 2182 radikoj (sume)<br>↳ AVE (Akademia Vortaro de Esperanto) : 4822 radikoj (= FdE + OA) |
| PV (*Plena Vortaro*, 1934) : 6900 radikoj<br>PIV (*Plena Ilustrita Vortaro*, 1970) : 15200 radikoj (39400 vortoj)<br>NPIV (*Nova Plena Ilustrita Vortaro*, 2002) : 16780 radikoj (46890 vortoj) |

Pri la elekto mem de la radikoj, Zamenhof plu uzis kompromisajn vojojn, kiujn oni povas forĵeti dum la posta evoluo de la lingvo, aŭ foje uzi kiel modelon por enkonduki novajn vortojn. Tiu strategio ĉefe aperis en la vorto-provizo, kiam mankis internacia radiko (ekzemple por ĉiutagaj vortoj). Tiel Zamenhof celis eviti dependencon al aparta etna lingvo.

[8] Tial oni observas konstruojn, kiuj ne plu estas uzataj kaj aspektas arkaikaj ; ekz-e ĉe Zamenhof : *la libristo-eldonisto ĝuste nun fermas* ***la de ŝi skribitan kaj de li legitan kajeron****.* (*Marta*, 1910) ; *poeto (...) kiu kantis pri la liberiginto de Svisujo kaj* ***pri la de Dio inspirita virgulino*** *de Francujo.* (*Fabeloj de Andersen*, 1916).
[9] Tiu evoluo estas ordinara en la etnaj lingvoj, kie ofte estas periodo de t.n. *eksika eksplodo*. Por la franca lingvo ekzemple, tiu periodo estis dum la 11-a kaj 14-a jarcentoj (Vd. Müller, 1985, p. 63).

Interesa solvo estis la uzo de miksaj formoj, tiel ke ne plu estas eble identigi ununuran fontolingvon, ĉar pluraj partoprenas samtempe por konstrui la radikon (tabelo 2).

*Tabelo 2 – Kompromisaj formoj inter pluraj fontolingvoj*

| | | | |
|---|---|---|---|
| lavango | germ. *Lawine* | kuko | germ. *Kuchen* |
| | ital. *valanga* | | angl. *cake* |
| ĉapitro | angl. *chapter* | gliti | germ. *gleiten* |
| | franc. *chapitre* | | fr. *glisser* |
| spegulo | lat. *speculum* | stablo | rus. *stanok* |
| | germ. *Spiegel* | | fr. *établi* |
| ŝtono | angl. *stone* | ŝpruci | germ. *spritzen* |
| | germ. *Steine* | | ital. *spruzzare* |
| ĝardeno | ital. *giardino* | ŝtupo | germ. *Stufe* |
| | angl. *garden* | | rus. *stupjenj* |

Kiam tiu kompromiso ne estis ebla, okazis modifo de la radikoj. Se temis pri longa radiko, la kripligo povis okazi per forigo de silaboj aŭ per uzo de pli simplaj formoj[10].

Alia solvo estis la paralela elekto de diversaj fontolingvoj por vortoj kiuj apartenas al sama gramatika kategorio aŭ semantika kampo. Jen kelkaj ekzemploj de tiu fenomeno :

- <u>tempaj adverboj</u> : lat. *hodiaŭ* (*hodie*) ; fr. *hieraŭ* (*hier*) ; germ. *morgaŭ* (*Morgen*)
- <u>partikloj</u> : lat. *sed* ; fr. *do* (*donc*) ; gr. *kaj* ; pol. *ĉu* (*czy*) ; germ. *nu* ; angl. *jes* (*yes*)
- <u>pronomoj</u> : angl. *ŝi* (*she*) ; fr. *ili* ; fr./angl. *oni* ; fr./angl./slav. *si* ; lat. *mi, ni, vi*

En aliaj kazoj, Zamenhof elektis la latinan kiel unikan fontolingvon, ekzemple por diversaj prepozicioj (*sub, super, per, pro, inter, post...*) aŭ por bestonomoj (*sciuro, anaso, erinaco...*), probable ĉar la latina ŝajnis al li la plej neŭtrala el la disponeblaj fontolingvoj.

Fine, oni devas aldoni ĉi tie ke la elekto de diversaj fontolingvoj povis ankaŭ okazi pro aliaj kialoj, interalie por eviti homonimojn[11]. Tiu deziro eviti homonimojn ankaŭ devigis Zamenhof al kripligo de radikoj, se la fontolingvo estis la sama[12]. Tion li faris ankaŭ por eviti mistranĉojn[13], kaj tiel klarigi inter la radika kaj la deriva karaktero de iuj apartaj vorto-formoj.

[10] Ekz-e : rus. *neprejmenno* ⇒ *nepre* ; lat. *procrastinare* ⇒ *prokrasti* ; lat. *praeter* ⇒ *preter.*
[11] Ekz-e, *sola* el lat. solus, sed *suno* el angl. *sun* (*lat. *sol*) kaj *grundo* el germ. *Grund* (*lat. *solum*).
[12] Ekz-oj el la franca : fr. *peser* ⇒ *pesi* ≠ *pezi* ; fr. *accorder* ⇒ *akordi* ≠ *agordi* ; fr. *vers(er)* ⇒ *verso* ≠ *verŝi*.
[13] Ekz-e : *diboĉi* (**de-boĉi*) ; *rikolti* (**re-kolti*) ; *cigaredo* (**cigar-eto*) ; *rubeno* (**rub-ino*) ; *makzelo* (**makz-ilo*).

## 5 Inercio kaj ekvilibrigo en la evoluo de Esperanto

La leksiko evoluis ekde 1905, almenaŭ laŭ la nombro de radikoj (*cf.* tabelo 1), kiuj nun estas pli multaj ol komence. Ekzistas debatoj pri la taŭgeco de tiu evoluo (Piron, 1987). Aliflanke, ni observas arkaikiĝon de iuj vortoj. Ĝi ofte devenas de la evoluo mem de la socioj, tiel ke multaj vortoj ne plu estas uzataj[14] (Johansson, 2005). Tio ne signifas ke ili ne plu estas uzeblaj, sed ke ili probable ne plu estas konataj de la plejmulto[15]. Inverse, la evoluo de la socioj ofte devigas enkonduki novajn radikojn, por novaj teknologioj aŭ sociaj realoj (*komputilo, interreto, televido...*). Tutlasta ekzemplo estas *koronaviruso* aŭ *kronviruso*, kun hezito de la parolantoj pri la uzenda formo. Diversaj instancoj povas influi la uzojn, kvankam la evoluo forte dependas de la inerciaj fortoj de la lingvo (Lo Jacomo, 1981 ; Gledhill, 1998).

La evoluo de la leksiko rilatas al la sistema ekvilibro de la lingvo. Foje aperas novaj radikoj anstataŭ malnovaj. La kunekzisto de similaj formoj ofte okazigas malaperon aŭ specialiĝon de la arkaika formo[16]. La formoj eniras jam ekzistantan sistemon. La ekvilibrigo mem de la lingvo kontribuas al tiu evoluo, ekzemple se iuj vortoj ne estas regule formitaj[17].

Kelkaj partoj de la vortprovizo klare plu mankas je kohereco. La landnomoj estas bona ilustraĵo. Ili povas esti endonimoj laŭ la nacia lingvo (ekz. *Barato*) aŭ ekzonimoj laŭ pli internacia formo (*Hindio*). Plie, ili baziĝas sur etnonimo (*Franco* estas nomo de loĝanto) aŭ sur toponimo (*Kanado* estas nomo de la lando), kun eventualaj hezitoj (ĉu *Koreo* estas lando aŭ logânto ?). Povas esti uzo aŭ ne uzo de sufiksoj (*Svisio* aŭ *Svislando*), kaj estas du eblaj sufiksoj, kun nuna emo anstataŭigi *-ujo* (*Francujo*) per la sufikso *-io* (*Francio*). La evoluo povas koncerni la radikon mem kaj ties formon (ekz. *Ĥin-* anstataŭ *Ĉin-io*)[18].

Tiu ekzemplo montras ke la ekvilibro de la leksiko ankaŭ dependas de aliaj partoj de la lingvo. Ekzemple, *Ĥinujo* ne estas arkaisma nur pro la uzo de la sufikso *-ujo*, sed ankaŭ pro la arkaismo de la radiko *ĥin-*, kaj ankaŭ pro la arkaisma uzo de la fonemo /x/. Tiu malapero de /x/ ja okazas interne de la fonem-sistemo. Sed la fonologio influas la evoluon de la leksiko.

[14] Jen kelkaj ekzemploj : *gamaŝo, stani, kitelo, stupo, nankeno, meĉaĵo, tombako, grafo, tetrao, krispo...*
[15] Eĉ por pli konataj vortoj kiel *grafo*, *Tekstaro* montras diferencon de frekvenco inter du ekvivalentaj periodoj : dum la unua periodo (1887-1917), *grafo* aperas 138 foje ; dum la dua (1995-2003), ĝi aperas nur 8 foje.
[16] Ekz-e : *malsanulejo* ⇒ *hospitalo* ; *depago* ⇒ *imposto* ; *dunaskito* ⇒ *ĝemelo* ; *rampaĵo* ⇒ *rampulo* ; ktp.
[17] Ekz-e : pro reinterpreto de *malgraŭ* kun la prefikso *mal-*, la nova formo *graŭ* fariĝas tute kohera neologismo.
[18] La politikaj situacioj kaj sociaj praktikoj ankaŭ povas evolui, ekzemple se aperas novaj landoj Tio laste okazis en la ekssocialismaj landoj. *Ĉekoslovakio* malaperis en 1993 kaj ekde nun estas du landoj ; sed kiel nomi la okcidentan : ĉu *Ĉeĥio*, ĉu *Ĉekio*, ĉu *Ĉeskio* ? Certe ĉi-terene estas ankaŭ influo de la etnaj lingvoj kaj de politiko.

Tio manifestiĝas en vortaroj per la enkonduko de novaj radik-formoj[19]. Do, tiuj neologismoj ne aperas pro novaj realaĵoj (*komputilo*), sed pro pli profunda modifo de la lingvosistemo.

La evoluo de la leksiko povas ankaŭ esti influata de la evoluo de la morfologio, kiel montris la rilaton inter vortfarado, sufiksoj, kaj landnomoj. Tio ankaŭ validas por la ekzisto de konkurencaj formoj kiuj finiĝas per *-cio* aŭ per diversaj pseŭdo-sufiksoj, kiuj originale devenas de la latina formo (*redakcio* aŭ *redaktejo, tragika* aŭ *tragedia, evolucio* aŭ *evoluo*...).

La morfologio ankaŭ evoluas. Ekzemple la morfemoj plu fariĝas memstare uzeblaj. Tiu procezo daŭris preskaŭ dekomence. Krom kelkaj esceptoj, nun estas ordinare uzi iun ajn vortelementon kiel radikon. Memstareco de la morfemoj koncernas la sintakson, la regulojn de vortfarado, kaj eĉ la konsiston de la vortprovizo[20]. Do ĉi tie ankaŭ la subsistemoj de la lingvo estas interligataj kaj kune evoluas. La lingvo evoluas senrompe kiel kohera sistemo.

Ni konstatas ke diakronio estas observebla en konstruita lingvo. Tio estas argumento por taksi Esperanton kiel vivantan lingvon, kaj ankaŭ kiel naturiĝantan lingvon. Fakte, ĉiuj ŝanĝoj, ĉu en etnaj lingvoj, ĉu en planlingvoj, ĉiam estas kaŭzitaj de la homoj mem, konscie aŭ nekonscie. Do, la *naturo*, laŭ la senco de la biologio, ne intervenas en tiuj aferoj. Tio, kio eble intervenas, estas la *homa naturo*, t.e. la deziro adaptiĝi kaj esprimi sin plej bone per lingvaj rimedoj. Per pli profunda rigardo al la lingvoj, tiu abstrakta nocio de *homa naturo* eble klariĝos. La kapablo de la homoj krei novajn lingvojn kaj igi ilin vivantaj, estas tiurilate kerna demando, kiu povas helpi nin pli bone kompreni el kio vere konsistas tiu *homa naturo*.

**Referencoj**

Detlev BLANKE (1985). *Internationale Plansprachen : eine Einführung 'Internaciaj planlingvoj: Enkonduko'*. Sammung Akademie-Verlag Sprache 34. Berlin: Akademie-Verlag.

Detlev BLANKE (2009). Causes of the relative success of Esperanto, *Language Problems and Language Planning (LPLP)*, n°3 / 2009, p. 251-266.

Ferdinand DE SAUSSURE (1995). *Cours de linguistique générale 'Kurso de ĝenerala lingvistiko'*. Parizo: Grande Bibliothèque Payot.

Michel DUC GONINAZ (red.) (2002). *Nova Plena Ilustrita Vortaro*. Parizo: SAT.

Christopher GLEDHILL (1998). *The Grammar of Esperanto. A corpus-based description 'Gramatiko de Esperanto. Korpus-bazita priskribo'*. München: Lincom Europa.

Emile GROSJEAN-MAUPIN (red.) (1935). *Plena vortaro de Esperanto*. Paris: SAT.

[19] Tiel aperas *tekniko* anstataŭ *teĥniko*, *kirurgio* anstataŭ *ĥirurgio*, *arkaismo* anstataŭ *arĥaismo*, kaj tiel plu.
[20] Ekz-e, *ulo* estas memstara vorto, kiu funkcias apud aliaj vortoj kun similaj signifoj (*homo, persono, individuo*).

Kanzi ITO (1973). *Unuaj libroj por Esperantistoj.* Kioto: Eldonejo Ludovikito.

Sten JOHANSSON (2005). Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj. En M. Lipari kaj H. Tonkin (red.), *Interlingvo inter lingvoj*, p. 221-241. Rotterdam: UEA.

Christer KISELMAN (2011). Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies*, n-ro 5, p. 79-149.

Ilona KOUTNY (2015). A typological description of Esperanto as a natural language *'Tipologia karakterizo de esperanto kiel natura lingvo'*. *JKI*, n-ro 10, p. 43-62.

Ilona KOUTNY (2018). De la planlingvo de Zamenhof ĝis nature disvolviĝanta lingvo : etapoj de la evoluo de Esperanto. En *Conferenze 141, Ludwik Zamenhof okaze de la centa datreveno de la morto*, Accademia Polacca delle scienze, p. 89-98.

François LO JACOMO (1981). *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto 'Libero aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto'.* Doktoriga disertacio. Universitato Parizo V.

Geraldo MATTOS (1987). *La deveno de Esperanto.* Chapecó: Fonto.

Ken MINER (2011). The impossibility of an Esperanto linguistics / La neeblo de priesperanta lingvoscienco. *Interlingvistikaj Kajeroj*, n-ro 2:1, p. 26-51.

Bodo MÜLLER (1985). *Le français d'aujourd'hui 'La franca hodiaŭ'*. Klincksieck.

Claude PIRON (1987). *La bona lingvo.* Vieno: Pro Esperanto.

Ziko Marcus SIKOSEK (1999). *Esperanto sen mitoj*. Antverpeno: FEL.

Gaston WARINGHIEN (1959). *Lingvo kaj vivo*. Antverpeno / La Laguna: Stafeto.

Gaston WARINGHIEN (red.) (1970). *Plena Ilustrita Vortaro*. Parizo: SAT.

Gaston WARINGHIEN (1980). *1887 kaj la sekvo...* La Laguna: Stafeto.

L. ZAMENHOF (1887). *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ 'Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro'.* Varsovio: Ĥaim Kelter.

L. ZAMENHOF (1888). *Dua Libro de l' lingvo internacia.* Varsovio: Ĥaim Kelter.

L. ZAMENHOF [1905] (1991). *Fundamento de Esperanto*. Pizo: Edistudio.

L. ZAMENHOF (1910). *Marta.* Parizo: Librairie Hachette et Cie.

L. ZAMENHOF [1916] (1932). *Fabeloj de Andersen.* Esperantista Centra Librejo.